

## Leterkesto IV.

Radioprelego de Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI, SRI 1990-004-A-1, 1990.02.03

Cl.- Nome de Svisa Radio Internacia vi aŭdas Claude GACOND kaj Andy KUNZLI, kiuj prezentos al vi la kvaran parton de la esperanto-leterkesto. Dum la pasintaj fojoj ni ĉerpis por vi korespondaĵojn de geaŭskultantoj el Argentino, Aŭstralio, Aŭstrio, Belgio, Brazilo, Britio, Bulgario, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Finnlando, Francio kaj Federacia Respubliko Germanio.

Ankaŭ el Germana Demokratia Respubliko skribis al ni pluraj gesamideanoj. Ni kore dankas pro iliaj salutoj okaze de festotagoj.

A.- Unuafoje ni ricevas leteron el Gvineo Bissau de sinjoro Manuel ALVES, kiu kaptis niajn elsendojn jam antaŭ tri jarojn en alia parto de la gvinea insularo. Sinjoro ALVES lernis esperanton en la jaro 1955, kaj dum lia restado en Bissau li neniam kontaktis kun aliaj esperantistoj.

Cl.- El Hispanio skribis al ni sinjoro Luis BLASCO, kiu loĝas en la urbo Zaragozo. Li aŭskultas preskaŭ ĉiutage niajn disaŭdigojn kaj foje eĉ kaptis antaŭan leterkeston. Sinjoro BLASCO dankas pro la ricevo de Svisa Esperanto-Revuo. Ĉar unu el niaj elsendoj estis dediĉitaj al la cikonioj, sinjoro BLASCO memoris amuzan anekdoton pri cikonioj en la zaragoza regiono, kiun li fine de sia letero rakontas. Okaze de vizito de eksterlanda geedza paro, kiu deziris viziti la plej proksiman vilaĝon al Zaragozo, kie troviĝas cikoniaj nestoj. Vidante birdojn sur la placo de la urbeto, iu kamparano alproksimiĝis dirante: La 14an de aŭgusto je la dekdua horo tagmeze la cikonioj foriras por ne plu reveni ĝis la proksima printempo. Sinjoro BLASCO tradukis tion al la fremdaj vizitantoj. Surprizite la gasto demandis, kiamaniere la cikonioj povas scii, kiam estos la 14a de aŭgusto je la 12a horo tagmeze. Tre facile, diris la loka kamparano, ĉar tiu dato estas la antaŭtago de la loka festo. Ĝuste je tiu horo sonas la unua rakedo anoncanta la feston. Do, la birdoj, ektimigitaj, forflugas aliloken eble dirante - ĝis la venonta printempo.

A.- En Segovio loĝas sinjoro César de MOSTEYRIN, kiu aŭdis prelegon pri la kaskado de la rivero Rejno ĉe la svisa urbo Schaffhausen. Ĝuste tiun naturfenomenon li vizitis kune kun sia edzino, kiam ili restadis en Svislando. Do estis por niaj hispanaj geaŭdantoj granda plezuro rememori pri tiu travivaĵo.

Cl.- Al sinjoro Josep ALTADILL el la hispana urbo Tortosa multe utilas niaj elsendoj, ĉar ili donas al li esperantan kaj ĝeneralan kulturon kaj multajn agrablajn horojn.

A.- Unu el la plej oftaj raportantoj el Hungario nomiĝas Paul FELSŐ. Fakte li estas nia kolego ĉe la Hungara Radio, kaj li ĉerpas el niaj informoj por plufluigi ilin tra la hungara radiokanalo.

Ankaŭ doktoron István NAGY el Budapeŝto ni povas kalkuli inter la regulaj aŭdantoj, kiuj interesiĝas pri okazaĵoj en Svislando.

Dankon al multaj hungaraj gesamideanoj, kiuj bondeziris al ni okaze de religiaj festotagoj.

Cl.- Ni scias, ke en Irano vivas multaj esperantistoj. De tempo al tempo ilia vivsigno penetras ĝis al ni. Regula aŭdanto el Irano estas ekzemple Colam REZA, kiun ni ŝatus tre kore saluti.

A.- Eĉ sur la insulo Islando oni aŭdas nin kaj ni ricevis kartsalutojn de sinjoro Karl SIGURDSSON el Rejkjaviko. Koran dankon.

Ankaŭ niaj ŝatataj najbaroj el Italio regule aŭskultas niajn elsendojn. La salutintoj devenis el la sekvantaj urboj: Verona, Bologna, Treviglio ĉe Bergamo, Monastier kaj Mogliano ĉe Treviso, Parma, Faenza, Padova, Ĝenovo, Roma, Udine, kaj Venecio.

Cl.- Sinjoro France MARN el Ljubljana en Jugoslavio, kiu estas okdekjaraĝa kaj ankoraŭ tre okupata, laŭdas nin pro la klaraj voĉoj, kiuj kreas simpatian amikecon pere de nia dua patra, respektive patrina lingvo esperanto.

A.- Sinjoro Ivo OREB el Vela Luka en Jugoslavio bedaŭrinde nur malofte povas skribi al ni, ĉar interalie la altaj afrankelspezoj en Jugoslavio limigas la korespondemon.

Cl.- En Kanado ni varme salutas sinjoron Sylvain BELISLE, kiu kaptis la elsendon, dum kiam oni ĉerpis erojn el Interpopola Konduto de Edmond Privat kaj komparis ilin kun la anglalingva versio. La anglan eldonon de tiu libro Sylvain BELISLE donace ricevis antaŭ sia foriro de Kultura Centro Esperantista, kie li restadis sufiĉe longan tempon. Do, ni esperas, ke la nova familio en Kebeko bone fartas kaj esperas, ke vi foje revizitos nin en Svislando. Kiam niaj kanadaj amikoj aŭskultis nin, ĉeestis foje aliaj esperantistoj, kiuj estis impresitaj pri la nova radiosperto, tiel ke ili decidis aĉeti taŭgan radioaparaton por povi regule aŭskulti nin. Kaj ĉiuj bedaŭris, ke la elsendo estis tiel mallonga.

Tute same kiel Sylvain BELISLE ankaŭ Mario FONSECA en Ontario bedaŭras la mallongecon de niaj disaŭdigoj. Li tre ŝatas ilin, ĉar li estas brazila radioamatoro, kiu ekde la jaro 1986 loĝas en Toronto.

Ankaŭ Pierre SAVOIE loĝas en Toronto. Li informis, ke malgraŭ ne ĉiam klara ricevo de la elsendo li tute komprenas nian programon. Dankon al vi pro la sciigo, kiaj frekvencoj plej taŭgas por Norda Ameriko. Ni notis vian konstaton.

A.- Kaj nun ni havas ankoraŭ liberan minuton. Mi kaptas la okazon demandi Claude Gacond: kio okazas ĉi-jare en Svislando?

Cl.- Do, ĉefe ni menciuj la kursojn, seminariojn, kiuj dum la tuta jaro disvolviĝas en La Chaux-de-Fonds. Estas ricevebla la programo de tiuj kursoj okazontaj. Simple oni skribu al Svisa Radio Internacia: mi deziras ricevi tiun programon, kaj ni sendos ĝin al la interesatoj.

A.- Kaj ofte junaj studentoj ŝatus veni al Kultura Centro Esperantista por partopreni staĝojn kaj diversajn aranĝojn, sed bedaŭrinde, tre ofte por ili tiuj aranĝoj, la aliĝo estas sufiĉe multe kosta. Kion fari ĉi-rilate ?

Cl.- Jes. Do, karakterizo de la agado ĉe Kultura Centro Esperantista estas ke ĉiam estas kelkaj junaj homoj, kiuj fakte restadas senpage, sed ili helpas. Do, eble inter la aŭskultantoj estas kelkaj junuloj aŭ studentoj, junulinoj, ĉu ne, ankaŭ studentinoj. Kelkfoje estas ankaŭ kelkaj aĝuloj. Ni ĵus havis polojn, kiuj venis tiamaniere. Ili skribu, ili kandidatiĝu dirante ekzakte, kion ili kapablas fari. Ĉu ne? Kelkaj venas por helpi en la kuirejo, aliaj venas por konstrui la centron. Grandparte ĝi konstruiĝis tiel. Aŭ venas por helpi, ĉar ili estas tre fakaj rilate al esperanto mem, en la sekretariejo. Kontraŭ duona helptempo ili ricevas ili ricevas ankaŭ senpage duonan kurstempon. Do, kelkaj ekzemple helpas plentempe unu semajnon kaj sekvas plentempe alian semajnon kurson, seminarion. Aliaj havas programon individuigitan kaj

duone-duone restadas en La Chaux-de-Fonds por studi kaj por helpi. Do, ni sendas al tiuj invitleteron, sed ili unue bone kandidatiĝu kaj ili ne ĉiam povas esti ĉiuj kune, ĉu ne. Do, ni aranĝas, ke la tutan jaron kelkaj povu profiti pri tio.

A.- Jam finiĝis nia elsendotempo, kaj ni daŭrigos prezenti korespondaĵojn el aliaj landoj venontsabate.

Nome de Svisa Radio Internacia parolis Claude GACOND kaj Andy KÜNZLI. Ĝis reaŭdo!

---

*Kopirajto © Claude GACOND, [www.esperanto-gacond.ch](http://www.esperanto-gacond.ch)  
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2012*